



# Novjorka Prismo

Numero 124

Majo 2003

## *La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia maja kunveno . . .*

**DATO:** Vendredon, la 16-an de majo 2003, 6:30-9:00 ptm

**LOKO:** United Federation of Teachers  
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC  
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

**PROGRAMO:** 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Eliana Dantas, el Brazilo, montros fotojn kaj bildojn pri Brazilo kaj pri sia urba, kultura, kaj esperantista vivo en Natalo, Brazilo.

– Muzikistoj Thomas Morgan kaj Jon Liechty ĝojigos nin. ★

## **Protokolo de la kunveno de la 25-a de aprilo 2003**

Tomaso ECCARDT malfermis la kunvenon je la sepa horo ptm. Ĉeestis 20 personoj, inter ili du gastoj.

INU Micutako, el Japanio, loĝas en Novjorko ekde januaro. En Kjoto, li organizis klubon de Esperanto. Li eksciis pri nia klubo dum li vizitis la oficejon de UEA kiel turisto ĉe UN. Li estas Pastro de Ŝinto kaj membro de Oomoto.

Brian SINGER laboras en Novjorko. Lia laboro rilatas al la problemoj de publika sano kaj eduko de infanoj en Tanzanio. Antaŭ dek jaroj, li estis en la Peace Corps, kie li instruis matematikon. Lia nuna laboro koncernas la preventon de HIV.

Cécile LOW, pasinta prezidantino de nia klubo, ĉeestis la unuan fojon post longa foresto. Ŝi prezentis sin al la grupo, ĉar multaj ĉeestantoj ne konis ŝin.

Oni menciis, ke 11 personoj, ne 10, ĉeestis la kunvenon en marto. Tuj poste, la protokolo de la kunveno de marto 2003 estis akceptata.

Tomaso menciis la kandidatigan komitaton, por kiu oni povas volontuli ĉe la venonta kunveno. Ĉi tiu komitato serĉas personojn, kiuj volontulas servi kiel parto de la estraro de la klubo.

Tomaso ankaŭ sugestis, ke ni pripensu lokojn por la ĉi-jara pikniko kaj por la someraj renkontiĝoj.

Nijl BLONSTEIN menciis, ke oni

povas vidi novigitan version de la filmo *Incubus* en loka teatro. La lingvo de la filmo estas malbone parolata Esperanto, kaj la ĉefa aktoro estas William Shatner. La filmo fariĝis dum la sesdekaj jaroj.

Rochelle F. GROSSMAN diris, ke ŝi ne scias ekzakte kiam la UFT transiros al nova konstruaĵo, do ŝi ne certas pri la loko de nia kunveno en majo.

Tomaso menciis, ke li serĉas samĉambran(in)on por la ELNA Jarkongreso en julio ĉe MIT en Cambridge, MA.

Je la sepa horo kaj duono, Brian SINGER komencis sian prelegon. Kutime, oni prelegas Esperante ĉe niaj kunvenoj. Tamen, ni permesis al Brian prezenti la prelegon angle, ĉar la ĉefo de la Esperanto-Societo de Tanzanio sendis lin por paroli al ni, kaj Brian ne parolas Esperanton. Brian prezentis al Tomaso kanon, kiu nomiĝas "kimbo." La kano estas donaco de la ĉefo de la Esperanto-Societo de Tanzanio al la prezidanto de la Esperanto-Societo de Novjorko. Oni fotografis la prezentadon.

Brian priskribis la du projektojn, en kiuj li partoprenas, "Zawadi" kaj "Zinduka." Li parolis pri la problemoj de malriĉuloj en Tanzanio. Post la prelego, ni demandis al li pri la kaŭzoj de la problemoj, kaj pri la efikeco de la solvoj. Granda problemo en Tanzanio estas la

manko de la rajtoj de virinoj. Se oni sek-satencas virinon, la leĝo ne defendos la virinon. Tiu-ĉi problemoj, kune kun la aliaj problemoj de la lando, kontri-



*Brian Singer kaj Rochelle F. Grossman.*

buas al la disvastiĝo de teruraj malsanoj.

Je 8:10 ptm, Nijl komencis debaton (aŭ diskutan rondon) pri la milito en Irako. Naŭ personoj donis siajn opiniojn, po kvin minutoj ĉiun personon. Oni demandis pri la veraj kialoj, pro kiuj la milito fariĝis: pro homaj rajtoj, aŭ pro iuj aliaj aferoj. Oni esprimis opiniojn favore kaj kontraŭ la milito.

Je 8:55 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon, uzante la "kimbo-n" la unuan fojon. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio kaj manĝajvendejo "Emma's Dilemma" por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Li ne iĝas kuirita hodiaŭ

Sciante la germanan, mi iam komencis studi la nederlandan. Mi ektrafis la sekvantan, al mi humuran, frazon: *Er wordt vandaag niet gekookt*. Tio unuavide ŝajnis al mi simili la germanan *Er wird heute nicht gekocht*, kiu signifas "Li ne iĝas kuirita hodiaŭ" (eble de kanibaloj). La vera nederlanda signifo, tamen, estis "Hodiaŭ ne estas kuirate". Tiu humuraĵo montras la uzadon de la pasivo en la plejparto de la ĝermanaj lingvoj. Oni uzas verbon signifantan "iĝi" kune kun la pasiva estinta participo. Pro tiu uzado, la ĝermanlingvanoj spertas iom da malfacilaĵo, uzante la (malsaman) Esperantan pasivon.

En sia libreto *Ne Kiel Meier!*, Raymond Schwartz diskutas ĉi tiun malfacilaĵon. Meier estis germana esperantisto, kiu miskonsilis pri la pasivo. La elekto inter la pasiva estanta participo (-ata) kaj la pasiva estinta participo (-ita) kaŭzas la problemon. La germana havas nur unu pasivan participon, esence estintan. *Er wird gekocht* signifas, ke li iĝas kuirita, tio estas, ke li estas kuirata. *Er ist gekocht* signifas, ke li estas

jam tute kuirita. Simile en la preterito, *Er wurde gekocht* signifas, ke li estis kuirata, kaj *Er war gekocht*, ke li estis tute kuirita. Meier tradukus *Gestern wurde er gekocht* kiel "Hieraŭ li estis kuirata", malgraŭ tio, ke la precipa afero estas, ke li estis tute kuirita. "Li estis kuirata" signifus, ke la procedo daŭris kelkan tempon: "Malgraŭ tio, ke li estis kuirata dum du horoj, li restis malmola".

Schwartz donas al ni la sekvantan gvidilon: "... la lernantoj tre baldaŭ sentos, ke 'ata' kunportas la ideon de 'ankoraŭ ...', daŭre', plu kaj plu ... 'aŭ 'ree kaj ree ...' k.s. En 'ita' ili sentos ion definitivan, 'faritan', 'finitan'." Se ni volas nur diri, ke io okazis en la pasinteco, ni devus uzi la pasintan participon (-ita): "Hieraŭ li estis kuirita kaj mangita de la kanibaloj". Se ni volas montri la daŭron aŭ ripetadon de ia ago, ni devus uzi la estantan participon: "Homoj estis kuirataj de tiuj kanibaloj preskaŭ ĉiun tagon. Hieraŭ ili kaptis alian viktimon. Li estas ankoraŭ ne kuirata, sed oni pretigas nun la kaldronon." ★

— Maurice WITTENBERG

## IBM Plaza

La 4-an de majo dek homoj venis al IBM Plaza por paroli, sed multaj ne tuj trovis nian grupon. En la mezo de la placo estis giganta plastika statuo de NFO (ne-identigata fluganta objekto), en formo de fiŝo, kun granda okulo je la antaŭa flanko. Do ni kunpremiĝis en nekutima angulo ĉe la enirejo. Spite tiu problemo, novulo Jeff BLAKESLEE sukcese trovis nin, post kiam li aŭdis iun paroli Esperanton. Jeff lernis Esperanton antaŭ jaroj, kaj finfine decidis ekoni vivajn esperantistojn la ununfojon. Oni parolis ĉefe pri venontaj someraj Esperantaj renkontiĝoj kaj kongresoj. ★

— Tom ECCARDT

## Laste vizitis

Restis en mia hejmo entute ses homoj dum aprilo, sed ne ĉiuj samtempe. Unue venis Stefano RICAGNO, filo de itala esperantisto. Kvankam li ne estas esperantisto, li parolis anglalingve kun mi pri multaj interesaj aferoj, inkluzive sian sciencan esploradon en Svedio. Poste venis Chuck SMITH, usona esperantisto kiu nun loĝas kaj laboras en Roterdamo. Li kaj 4 aliaj esperantistoj ĉeestis konferencon, *Esperanto@interreto*, kies nomo klarigas sian temon. Post tiu konferenco, Chuck revenis kun 3 aliaj esperantistoj, Oleg, Hoka, kaj Sonja, el Rusio, Svedio, kaj Serbio. Oleg foriris post nokto, kaj poste venis Nastja (rusa), kiu ankaŭ ĉeestis la konferen-

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!  
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Majo 2003**

**16**

### ESNY KUNVENO

Fotoj de Brazilo: Eliana Dantas  
Muziko: Tom Morgan/Jon Liechty  
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

**Junio**

**1**

### Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM  
(Limdato por kontribuoj por *Prismo* 125)

**?**

### ESNY SOMERA PIKNIKO

Ni elektos daton kaj lokon  
dum nia maja kunveno.

United Federation of Teachers (UFT)  
260 Park Avenue South, NYC  
(20th/21st Streets), second floor  
(check schedule in lobby for room number)  
"IBM" Building Atrium (antada nomo)  
590 Madison Avenue (56th Street) NYC  
Street level, in the Atrium

con. Hazarde, ĉiuj miaj aprilaj gastoj venis de Eŭropo, sed multaj ne naskiĝis kie ili laboras. Ĉiuj ĉeestis konferencon iom for de Novjorko, sed venis por turismi ĉi tie. ★

— Tom ECCARDT

## Unitarlana Asembleo

Post malgranda informado ĉe mia propra unitarlana preĝejo mi deziris fari ion pli seriozan dum la plej granda renkontiĝo de unitarlanoj — la Ĝenerala Asembleo. Hazarde ĝi okazas en la sama urbo kiel la ELNA Jarkongreso, Bostono. La Ĝenerala Asembleo komenciĝas semajnon antaŭ la ELNA Jarkongreso. Mi aĉetis tablon por ekspozicio kaj jam kontaktis dek homojn, kiuj kunlaboros. Vi povas senpage iĝi volontulo ĉe tiu ĉi ekspozicio. Oni antaŭvidas ses mil vizitantojn. ★

— Nijl BLONSTEIN

## ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041  
[http://www.geocities.com/esperanto\\_nyc](http://www.geocities.com/esperanto_nyc)

Prezidanto  
Thomas Eccardt  
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino  
Rochelle F. Grossman  
(718) 457-1490

Protokolisto  
Stuart Green  
(631) 751-5683

Vicprezidanto  
Thomas Leong  
(718) 981-4252

Kasistino  
Sofiya Suskina  
(914) 738-6084

Program-Direktoro  
Neil Blonstein  
(212) 663-2020

## Novjorka Prismo

Numero 124 — Majo 2003  
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro  
Jim Medrano  
(212) 982-5029

Subredaktoroj  
Thomas Eccardt  
Nancee Medrano

Desegnistino  
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:  
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103  
e-poŝto: [medrano@mac.com](mailto:medrano@mac.com)

© 2003 Esperanto Society of New York